



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 2/1974 - 11 jan 1974
Aperas ĉiusemajne

Jarkomenca evento en Paderborn

Dua intensiv-kurso de Esperanto

Paderborn. (pp) En ĉeesto de 50 personoj estis malfermita la dua intensivkurso de Esperanto en la lingvolaboratorio de la integra altlernejo de Paderborn. Inter la ĉeestantoj estis honoraj gastoj, kiel la distriktestro Köhler, kaj partoprenantoj de la internacia GEJ-seminario, kiu ĉi-jare okazis en Kassel. Kulmino de la inaŭguro estis prelego de Prof. D-ro H. Frank pri siaj tezoj rilate al la germana lingvopolitiko. La kurso daŭris de la 2 - 7 jan 74, partoprenis ĝin 32 personoj. Raportis la loka gazetaro.



Nia bildo montras agantojn de la inaŭgura ceremonio de Paderborn: (De maldekstre) Prof. D-ro Helmar Frank, Helmut Klünder, Hermann Behrmann kaj D-ro Hans Kasselmann.

Vigla interesiĝo por la lingvopolitikaj tezoj

Alvoko al la germanaj esperantistoj

Paderborn (pp) Prof. D-ro Helmar Frank, direktoro de la Instituto por Kibernetiko Berlin kaj Paderborn, pri kies lingvopolitikaj tezoj ni jam raportis, sciigas al ni, ke li intertempe gajnis viglan interesiĝon por tiuj tezoj en la Liberala Klubo Paderborn kaj ke li fare de tiu forumo transdonis la tezojn al diversaj instancoj de la Libera Demokrata Partio (F.D.P.), al kiu li mem membriĝis. La prezidanto de F.D.P., federacia ministro Walter Scheel, iniciatis ekzamenon de la tezoj en la diversaj fakoj de la ministerio por eksteraj aferoj. Ankau la Bundestag-frakcio de F.D.P. okupos sin dum la venontaj semajnoj pri la tezoj lige kun demando al la federacia registaro. Prof. Helmar Frank alcelas la planon, ke unuflanke la ministerio por eksteraj aferoj kaj la ministerio por klerigo kaj scienco, sed aliflanke ankaŭ la politikaj partioj laŭeble baldaŭ kreu lingvopolitikan konsultan gremion kun la taskoj alparolitaj en la "tezoj". Speciale estu ekzamenita la ebleco, fari transpaŝeblaj la interneŭropajn lingvojlimojn per planlingvo. Tiucele necesas kompari Esperanton kun aliaj eventualaj alternativoj diskutablaj. Pro tio estas tuŝataj la intereso de la germanaj esperantistoj rekte. Profesoro Frank nun petas por tiu unue parti-interna agado pri subteno tiamaniere, ke membroj de F.D.P. kaj simpatiantoj al tiu partio skribu al li, por ke li interkonsentu kun ili pri "koncertita agado". Prof. Frank proponas, ke membroj de la du aliaj partioj entreprenu similajn paŝojn interne de CDU resp. SPD. Jen la adreso: Prof. Dr. Helmar Frank, 479 Paderborn, Brockhöfe 2.

Aĉetu kaj uzu la glumarkojn de la 59a UK kaj de la 30a IJK 1974

Mendu ĉe Libroservo Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113
PSchK Nürnberg 819 56-851



Fine de la jaro 1973 aperis en Hungario poŝtkarto kun surprisita Esperanto-poŝtmarko (vidu la maldekstran bildon!)

Okaze de la 3a Vintra Esperantista Ferio en Budapeŝto (28.12.73 - 2.1.74), kiun partoprenis pli 260 personoj el kelkaj landoj, loka poŝt-oficejo uzis esperantlingvan memorstampon kaj unuan tagan stampadon la 28 dec 1973.

La urbo Prilep kun esperanta ekstera aspekto

Prilep (Jugoslavio) (pp/mĝ) Impresplena estis kalktaga omaĝa celebrado de Zamenhoftago en makedona urbo Prilep. La tiea Esperanto-societo "La Progreso" festis sian 45-jaran datrevenon. Ĝi-okaze estis inaŭgurita la busto de Zamenhof, verko de makedona skulptisto Boris Nikolovski, en la urbocentro kaj samtempe kelkaj institucioj nomigitaj laŭ la nomo Esperanto aŭ Zamenhof, tiel ke pluraj grandaj verdkoloraj tabuloj atentigas pri la Internacia Lingvo. La motelo ĉe Prilep-lago, 7 km malporksime de la urbocentro, ricevis la nomon "Esperanto", same granda nova aŭtobuso, destinita por la ekskursoj al Istambulo, krome la oftalmologia kliniko de la urba hospitalo ricevis la nomon de d-ro Zamenhof.

En ekspozicio de infandeseĝnaĵoj pri la temo "L.L. Zamenhof" estis montritaj 80 plej sukcesaj desegnaĵoj de lernantoj de superaj klasoj de lokaj elementaj lernejoj. La solenaĵon i.a. partoprenis s-ano Dimĉe Bojanoski-Dize, iama sekretario de la unua societo, estinta prezidanto de Makedonia Esperanto-Ligo kaj estinta ministro pri komerco en la registaro de PR Makedonio, kaj Marinko Ĝivoje, elstara jugoslavia esperantisto, kiu malfermis la buston kaj prelegis pri la temo "La jularo kaj lingva diskriminacio en la mondo".

Pli ol 60 diplomoj por aktiva kaj fruktodona laboro en disvastigado de Esperanto estis transdonitaj al tri falintaj naciaj herooj-esperantistoj el Prilep, pere de iliaj familianoj, al la unuaj pioniroj de Esperanto en la urbo kaj kelkaj aliaj lokoj, al la plej aktivaj nunaj movadgvidantoj kaj al kelkaj organizaĵoj, institucioj, entreprenoj kaj lernejoj kun kiuj la societo firme kunlaboras.

Resume, Esperanto-societo "La Progreso" kun 380 membroj kaj multaj amikoj de Esperanto, kun kelkaj sekcioj kunlaborantaj kun la urbaj samspecaj societoj, kun Esperanto-biblioteko havanta pli ol mil volumojn, kun daŭraj kursoj en la lernejoj eliris el la kvar societaj muroj, kaj la vojo kiun ĝi elektis estas la vojo irota. Ĝi estas nun sendube la plej aktiva Esperanto-societo de Jugoslavio.

"L' espéranto sans peine" estis nomita libro de la jaro en artikolo en La Voix du Nord kaj aliaj.

Homoj kaj nomoj

kun kaj sen renomoj

La unua urbestro de Kronach, Baptist Hempfling, antaŭ nelonge invitis la kunlaborantojn de la urba trafikoficejo, kiuj estas komisiitaj pri la organizado de la postkongreso en Kronach, kaj du reprezentantojn de la Esperanto-rondo en la urbodomon, por preparoli la preparojn kaj programon de la postkongreso.

Landrat (distriktestro) Köhler, Paderborn, transdonis al la partoprenantoj de la 2a Esperanto-intensivkurso en Paderborn la salutojn de la urbo kaj distrikto.

Flora Szabo-Felsö, prezidantino de TEJO, Tomas Jansson el Svedio, Mauro la Torre, Italio, kaj Terenc Watts, Hispanio, estis inter la partoprenantoj de la Paderborna intensivkurso.

Por Andrzej Pettyn, Varsovio, la jaro 1973 metis mejloŝtonon en la familia vivo. Li ricevis jarfine novan loĝejon.

Kapitano Teresa Remiszewska, la fame konata velistino, membro de la Filio de PEA en Gdynia, intencas baldaŭ ĉirkaŭveli la mondon.

René Llech-Walter, konata esperantisto el Perpignan, Francio, estis intervjuita de regiona televido sur la strato "D-ro Zamenhof" situanta en la urbocentro. Sekve de tiu intervjuo okazis alia televida elsendo kun Llech-Walter prezentante la unuan lecionon de Esperanto kun gramatikaj klarigoj. (15.12.73)

Andrzej Pettyn, redaktoro de la Esperanto-redakcio de Pola Radio, raportis en la kutima radio-rubriko "El la vivo de Pola Esperanto-Asocio" pri la ĵus okazinta plen-kunsido de la ĉefa estraro de PEA. Laŭ la prezidanta raporto aperis dum la pasintaj 18 monatoj en Pollando 6 Esperanto-libroj en eldonkvanto de entute 65 000 ekzempleroj kaj 3 pollingvaj informiloj en kvanto de 31 000 ekzempleroj.

La franca ĵurnalo LA DÉPÊCHE aperigis la 9 dec 1973 studon pri Esperanto de d-ro A. Albault.

Eduard Haider, Graz, esperantisto kaj membro de la komunista partio de Aŭstrio, publikigis en la komunista gazeto "Volksstimme" longan artikolon sub la rubriko "Diskutado por la 22a Partia Tago de KPÖe". La 22a partia konferenco, kiu okazos dum januaro 1974, laŭ la propono de Eduard Haider traktu ankaŭ Esperanton.

Denove Tago de malfermita pordo en Nürnberg

Informcentro Esperanto Nürnberg okazigos denove tagon de malfermita pordo en Meistersingerhalle la 24an de marto 1974 kun informstano, libro-ekspozicio kaj prelego pri japana temo de Michael Zeilinger. Gastoj bonvenaj. Detaloj sekvos!

Radio Bervalio respondas...

D: Ĉu estas dezirinde, ke naciaj nenionfarantoj fariĝu membroj de la Esperanto-movado?

R: Ne estas dezirinde! La Esperanto-movado jam havas tro multe da nenionfarantoj!

Esperanto en la radio

Vieno. Por la unua fojo ni povis aŭskulti al la novaj mallongondaj elsendoj de Radio Vieno, sabate la 5an de januaro. Forte, klare kaj elegante aŭdiĝis la voĉoj de la du parolistoj. La unua parto estis dediĉita al komentario de Alfred Macher pri problemoj, kiu okupas nuntempe multajn homojn, la efikon de la "nafto-krizo" al la uzado de la aŭtomobilo. Ĉu malpermeso de aŭtoveturado dum certaj tagoj aŭ porciumado de la benzino, je stariĝas la demando en Aŭstrio. La dua parto raportis pri Max-Reinhard-ekspozicio en la historia muzeo de Vieno okaze de la 100a datreveno de la naskiĝo kaj la 30a datreveno de la morto de Max Reinhard. Je la fino oni danke kvitanĉis la ricevon de aŭskultantaj korespondaĵoj el Ĉeĥoslovakio, FRG, Francio kaj Hungario. Oni aŭdis konatajn nomojn, kiel Dr. Josef Kondor aŭ Henri Masson.

Zagrebo. Je la unua elsendo de la nova jaro el Zagrebo oni ne forgesis rakonti pri la maniero, kiel la jugoslavoj bonvenigis la novan jaron. Post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio radia humoraĵo rakontis pri la senpatinda scito de poeto, kies talentoj pereis en ĉiutaga oficeja rutino. Kelkaj informoj el jugoslavia Esperanto-vivo ĉesigis la elsendon.

Romo estis preskaŭ ne aŭdebla kaj komprenebla. Same validas por Pekino, kiu jam de semajnoj ne pluaŭdiĝas sur la kutimaj ondoj.

Berno-ro A. Baur prezentis prelegon pri la alpoj kaj ges-roj Gaconĉ daŭrigis sian prelegon pri junulara enketo de Neuchatel. Ĉi-foje ili traktis la sintenon de la junularo al estonta profesio. Dum la proksima elsendo estos analizita la sinteno de junularo al hobiaj kulturoj.

Varsovio. La dimanĉan Esperanto-Ekspreson mi ĉi-foje aŭdis en rondo de geesperantistoj en la najbara urbo Fürth en la hejmo de ge-sroj Zeilinger. Inter la aŭskultantoj estis ankaŭ la preskaŭ tri-jara Toru Andreas Zeilinger, kiu iom post iom nun ankaŭ majstras la genetivon en Esperanto ne plu imitante la japanan manieron. La aŭdebleco estis bona. Cetere, la aŭskultebleco varias de tago al tago, ĝenerale ĝi estas bona, sed la 9 januaro posttagmeze je la 16,30 h la elsendo entute ne estis kaptebla kaj aŭdebla. En intervjuo kun N. Aleksiev oni eksciis, ke nun la revuo "Paco" regule aperadas en Bulgario, la abonkotizo por okcidentaj landoj estas 15 ff. La semajna rubriko "El la vivo de PEA" raportis pri la sukcesa agado de la nova ĉefa estraro de PEA dum la pasintaj 18 monatoj, la financa stato de PEA nun stabiligis, farita estis granda laboro. Okaze de la Jartrideko de PR Pollando aperos kelkaj broŝuroj informaj, i.a. Pollando, nombroj kaj faktoj, bibliografio de polaj E-elsonaĵoj dum la pasinta jartrideko, centra E-solenaĵo okazos 1974 en Varsovio. Esperanto-kluboj eksterlandaj povas peti materialon por polaj klubvesperoj. Oni demove atentigis, ke la Esperanto-Ekspreso povas raportiti aktuale kaj interese nur kun la helpo de la aŭskultantoj.

Pri kio oni parolas en Pollando? Je la komenco de nova jaro oni parolas pri la problemoj en la estonto kaj pri la struktura krizo en la okcidento. Laŭ la komentisto konturiĝas klara kontrasto inter oriento kaj okcidento kiel inter du mondoj. Oni ankaŭ entreprenas ŝparprogramon en Pollando, sed la kaŭzoj estas aliaj ol en okcidento. Sed oni ankaŭ parolas pri futbalo, speciale nun post la rezulto de la lotumado: Kiu teamo ludos kontraŭ kiu? Lagrupo 4 laŭ opinio de la felietonisto ne estas facila: Haitio, Argentino, Italio kaj Pollando, la futbala sensacio.